**Trejnilo de Esperanta Leksiko**
Prilaboris: **Ryszard Rokicki**

# TESTO 46

## **Ekzerco 1.** Kompletigu la vortspacon.

**1.** Propran **ĝ** ␣ **b** ␣ ␣ neniu vidas.

**2.** La partoprenantoj de la diskuto konkludis, ke por evoluigi la fakan lingvon en Esperanto necesas unue eduki esperantistojn pri ␣ **r** ␣ **nc** ␣ **p** ␣ ␣ de terminologia kaj vortarista laboroj.

**3.** Kiel senpagan ␣ ␣ **pl** ␣ **m** ␣ ␣ **t** ␣ ␣ ĉiuj abonantoj de *La Ondo de Esperanto* ricevos libreton *Esperanto en Ruslando*.

**4.** La plej grava afero estas, ke Daniel Luez redonas la ĉiutagan lingvaĵon en adekvata maniero, li rekreas eĉ **s** ␣ **bt** ␣ **l** ␣ ␣ ␣ nuancojn de la originalo.

**5.** Ni, loĝantoj de fora sovaĝa Siberio, ne ofte ␣ **ŭd** ␣ **c** ␣ ␣ eliĝi el nia hejma marĉo, tamen somere 2002 mi forlasis Tomskon, kaj venis en Kaliningradon.

**6.** Se nin, la unuajn batalantojn por Esperanto, oni devigos, ke ni evitu en nia agado ĉion idean, ni ␣ **nd** ␣ **gn** ␣ disŝiros kaj bruligos ĉion, kion ni skribis por Esperanto.

**7.** Antaŭ la pordego de la mortintino jam estis postenigitaj policistoj kaj negocistoj paŝadis kvazaŭ **k** ␣ **rv**␣ ␣ elflarintaj kadavron.

**8.** Mi nemulte spektas ␣ ␣ **l** ␣**v**␣ **d** ␣ ␣, sed konstatas, ke popularas distraĵoj kaj ludprogramoj.

**9.** La revuo *Juna Amiko* nun havas varb-direktanton, kiu sendos ␣ **p** ␣ **c** ␣ **m** ␣ **n** ␣ ␣ ␣ ekzemplerojn al petantoj, rilatados kun perantoj kaj starigos varb-kampanjojn.

**10.** Nilo anstataŭ flui en mallarĝa ␣ ␣ **r** ␣ **d** ␣ **r** ␣ dividiĝas en kelke da brakoj sur vasta ebenaĵo, kiu havas formon de triangulo, nomata Delto de Nilo.

## **Ekzerco 2.** Finskribu ĝustan vorton.

**1.** La solenaĵon okaze de la datreveno de liberigo de nazia koncentrejo en Dachau partoprenis ankaŭ ambasadoroj aŭ **k** ␣ **ns** ␣ **l** ␣ ␣ kaj iamaj arestitoj, kelkaj nun tre aĝaj.

**2.** Mi konfesas, ke mi ĝuis la legadon de tiuj aldonoj, jes, malgraŭ ilia polemika aspekto, pro la **ir** ␣ **n** ␣ ␣ tono, kiu, verŝajne, ne plaĉos al ĉiuj, sed amuzis min!

**3.** La juĝejo, kiel la plej supra aŭstra **i** ␣ **st** ␣ ␣ **c** ␣, konkludis, ke ĉiu loko, kie vivas pli ol 10% da slovenoj, havu dulingvan loknoman tabulon.

**4.** Ekde la numero 1999:16 la internacia sendependa gazeto ***H*** ␣ ***r*** ␣ ***l*** ␣ ␣ *de Esperanto* estas redaktata, grafike aranĝata kaj enpaĝigata en Slovakio.

**5.** La propagandisto volas facilan Esperanton, kiun li povus verŝi rapide, per tute eta **f** ␣ **n** ␣ **l** ␣, en la kapon de ĉiu homo.

**6.** Kaj mi diras al vi, ke junaj, bonmanieraj, belfiguraj komizoj faras bonan **e** ␣ ␣ **kt** ␣ ␣ kaj altiras al la magazeno la aĉetantojn, aŭ pli ĝuste la aĉetantinojn.

**7.** Ĉiuj cirkonstancoj faris, ke la popolo loĝanta en la valo de Nilo devis aŭ **p** ␣ **r** ␣ ␣, se ĝi estis malforta, aŭ reguligi la akvojn, se ĝi estis genia.

**8.** La granda celo de Unesko estas kolekti 100 milionojn da subskriboj por Manifesto 2000, kiujn oni transdonos al la Ĝenerala **A** ␣ ␣ **m** ␣ ␣ ␣ ␣ de UN en septembro 2000.

**9.** Scienca materialo estas havenda, krom se ni estas kontentaj, ke Esperanto estu rigardata kiel nura ŝatokupo aŭ manio de **a** ␣ **a** ␣ ␣ **r** ␣ ␣ kaj diletantoj.

**10.** La ĉefa kialo de la dronado de Titanic estis brulego interne de la ŝipholdo kaj ne la glacimonto, kun kiu la luksa vaporŝipo **k** ␣ **l** ␣ **z** ␣ ␣ ␣ en la norda parto de Atlantika Oceano.

## **Ekzerco 3.** Kreu el la radikoj ĝustan vorton kaj enskribu ĝin.

program', mirind', insid', klub', split', eklezi', abstin', preleg', sterk', enket'.

1. Bruselo strebas kompensi la informan izoladon: temas ĉefe pri forigo de mitoj pri ␣ ␣ ␣ ␣ **d** ␣ **m** ␣ de EU, kiu laŭdire klopodas "aĉeti" la lojalecon de kipraj turkoj.

**2.** Sojle de la vizito de Johano Paŭlo la 2a plifortiĝis la protestaj voĉoj, plivastiĝis la manifestacioj, organizitaj de paroĥanoj kaj ␣ ␣ ␣ ␣ **z** ␣ ␣ **l** ␣ ␣ de la ortodoksa eklezio de la moskva patriarkejo.

**3.** Triono de la italoj trinkas nur ĉe apartaj, gravaj okazoj, iom malpli ol triono postulas ĉiutage vinon ĉetable, dum 6 % estas ␣ ␣ ␣ **t** ␣ ␣ ␣ **l** ␣ ␣ kaj tute rifuzas vinon.

**4.** En la semajnfino 15-16 de majo 1999 estis inaŭgurita la nova sidejo de Zurika E-Klubo, kiu funkcios kiel librovendejo, kontoro kaj ␣ ␣ ␣ **l** ␣ ␣ ␣ **j** ␣.

**5.** La vizitantojn de la klubejo atendas travivaĵo por ĉiuj sensoj, plena je poezio kaj surprizoj kaj ankaŭ ekspoziciaj ␣ ␣ ␣ ␣ **r** ␣ ␣ ␣ **r** ␣ ␣: teatraĵoj, muziko kaj prelegoj.

**6.** Dum la festeno de la Zamenhof-tago okazis festparolado de la prezidanto de la E-klubo kaj koncerto de la ␣ ␣ ␣ **b** ␣ **n** ␣ ␣, kiun partoprenis duono de la ĉeestantoj.

**7.** Kelkaj bonfaraj fondusoj ␣ ␣ ␣ ␣ **t** ␣ **ĝ** ␣ ␣, do oni ricevas du almozpetojn anstataŭ unu.

**8.** Specialisto de la Ĉina Akademio de Sciencoj diris, ke sen kemia ␣ ␣ ␣ **r** ␣ ␣ **ĵ** ␣ eble duono de la ĉinoj nun malsatus.

**9.** Jam tio estas miraklo, ke ĵurnaloj ĉiumatene aperas, eĉ se dum la antaŭa tago okazis absolute nenio; sed ĉi tiu ␣ ␣ **r** ␣ ␣ ␣ ␣ **ĵ** ␣ estas redakcia sekreto.

**10.** Ion similan mi memoras el la Sovetia epoko, kiam ni devis, ĉe enhoteliĝo, indiki en la ␣ ␣ ␣ ␣ **t** ␣ **l** ␣ nian vojaĝocelon.

**Ekzerco 4.** Marku taŭgan vorton:

**1.** Konate estas, ke en Slovakio akuŝo aŭ operacio de dorso subaĉete kostas ĉirkaŭ 200 eŭrojn, operacio pri koksa ___ 1000 eŭrojn.

**a.** braceleto **b.** sofo **c.** palmo **d.** artiko

**2.** Libervolaj fajrobrigadoj per miloj da pumpiloj sekigis akvoplenajn kelojn, ili savis homojn kaj bestojn kaj liveris nutraĵojn al tiuj, kiuj restis en domoj ___.

**a.** inspiritaj **b.** flustritaj **c.** inunditaj **d.** liveritaj

**3.** Poste, kiel en ĉiuj grandaj projektoj, montriĝas ke la ___ estis tute nerealisma, kaj la realaj kostoj du- aŭ triobliĝas.

**a.** cindro **b.** budĝeto **c.** paneo **d.** gripo

**4.** La juna germana historia skolo diferencas de la maljuna i.a. per sia intereso pri ___ politiko – pensioj, asekurado kontraŭ malsano, akcidentoj kaj senlaboreco.

**a.** sociala **b.** klinika **c.** absurda **d.** ajla

**5.** La ĉefa tasko de la asociaj ___ estas informado de la membroj kaj kunordigo de la agado esperantista en la koncerna lando aŭ regiono.

**a.** sandviĉoj **b.** klimatoj **c.** bultenoj **d.** likvoj

**6.** La akvo de Nilo jam iom malleviĝis kaj komencis fariĝi klara, kiel ___.

**a.** akrido **b.** palpebro **c.** kukumo **d.** kristalo

**7.** En 1939 Sovetio nuligis la ___ pri reciproka neatakado, kaj la 29an de novembro ĝi nuligis ankaŭ la diplomatiajn rilatojn kun Finnlando.

**a.** satiron **b.** princon **c.** traktaton **d.** akademion

**8.** La averio de la ___ apud la sovetia, nun ukrainia Ĉernobilo en 1986 estas ĝenerale konata.

**a.** lilio **b.** kubo **c.** centralo **d.** akso

**9.** Multaj enmigrintoj ricevos - se entute - nur helplaborojn por ___ salajro.

**a.** minimuma **b.** vegetara **c.** vanta **d.** abrupta

**10.** Sinjorino Herminio pasie amis blankajn rozojn kaj la odoron de ___.

**a.** licencoj **b.** kirurgioj **c.** konvaloj **d.** adverboj